

Justinus Kerner,
Eltrinku la vinon

tradukita de Ludwig Emil Meier

Eltrinku la vinon, foriras nun mi;
adiaŭ, karuloj, en hejm' tie ĉi!
Adiaŭ, vi montoj, gepatra tegment',
perforte fortiras min freŝa la vent'.

La suno ne restas ĉe sama stelar',
trans landojn ĝi migras kaj super la mar'.
La ondoj ne haltas ĉe sia la bord',
la ventoj forkuras muĝante kun fort'.

Kun nuboj rapidaj la bird' flugas for,
al landoj tutfremdaj ĝin tiras la kor'.
Kaj tiel junulo migremas sen fin',
simila al tero, al sia patrin'.

Salutas lin sonoj konataj trans mar',
de l'hejm' alfluginta kantanta birdar';
Lin tuŝas de floroj intima odor',
la ventoj patrujaj alblovas ĝin for.

La birdojn li konas el sia hejmland',
la florojn li iam kolektis, amant';
kaj amo lin sekvas, sekreta mister',
lin faras enhejma sur fremda la ter'.

*Traduko de la Germana poemo "Wohl auf noch getrunken" de JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 - †1862-02-21) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 - †1919).*

Arg-1030-2090 (2014-05-30 10:37:35)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier. La esperantigon de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libreto "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio.

Justinus Kerner,
Nun estu trinkata

tradukita de Manfred Retzlaff

Nun estu trinkata brilanta la vin'!
Karuloj, mi devas forlasi nun vin.
Adiaŭ vi montoj kaj patra vi dom',
Pelata mi estas migrema mi hom'.

La suno ne restas sur lok' ĉe l' ĉiel',
Ĝi iras antaŭen laŭ sia korpel'.
La ondo ne restas soleca ĉe l' strand'.
La ŝtormo bruadas potence tra l' land'.

Kun hasta nubaro la bird' flugas jen
Kaj kantas enfore pri sia reven'.
Peliĝas nun same la hom-junular',
Por migri eksteren tra lando kaj mar'.

Salutas lin tie jen super la mar'
El lia hejmlando veninta birdar';
Odoras hejmece ĉirkaŭe de li,
Peliĝas aere eĉ ĝis tie ĉi.

La birdoj rekonas la domon de li,
La florojn li plantis pro am' tie ĉi.
La amo, ĝi sekvas lin ja ĉie ĉi,
Hejmeca fariĝas la foro por li.

*Traduko de la Germana poemo "Wohl auf noch getrunken" de JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 - †1862-02-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2014.*

Arg-1030-2265 (2015-01-28 00:00:06)